

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Ivan Colling

Ronald Glossop

Mireille Grosjean

Ewa Kukielka

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Raita Pyhälä

Gabrielle Tréanton

Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto

13 - 16 majo 2015

Svislando

Neuchâtel

Aŭlo de la junaj lagobordoj

(Aula des Jeunes Rives)

La Chaux-de-Fonds

Centro de Dokumentado kaj Esploro

pri la Lingvo Internacia CDELI

Urba biblioteko





Neuchâtel: universitato kaj lago (foto de Mirejo Grosjean)



La Chaux-de-Fonds: urba biblioteko, Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) (foto de Mirejo Grosjean)

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la
Societo pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La
Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez de UEA.

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

**VI LERNAS. ILEI HELPAS
ILEI bezonas subtenon. Ĉu vi
estas instruisto, ne gravas.
Membriĝu!!
Arigu novajn membrojn!!**

Enkonduko

Karaj Legantoj,

malfermante la revuon, vi certe surpriziĝis, ĉar anstataŭ la enhavtabelo sur p. 2 aperas kolorfotoj. Pro la preseja tekniko, tiu plia kolorpaĝo ne altigas la preskostojn de IPR. (Pri la manko de enhavtabelo ne timu, ĝi simple transiris al la 4-a paĝo, kune kun la informoj pri nia estraro). Ankaŭ la Scienca Komitato de IPR renoviĝis (*vd maldekstre*).

Plurajn artikolojn de la nuna numero kunligas Instruista Trejnado (IT) kaj Unesko. Ne nur ILEI, sed ankaŭ Unesko opinias, ke gravas la kvalito de IT, *vd* la artikolon de Stefan MACGILL (*p. 6*). Por subteni tiun celon, Ilona KOUTNY prezentas la 3jarajn post-diplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio (*p. 11*). Tuj poste vi trovos nian kalendaron pri IT-kursoj inter julio 2014 kaj julio 2015. ILEI ŝatus ricevi la statuson de NRO ĉe Unesko. Ankaŭ Ronald GLOSSOP puŝas al pli aktiva agado ĉe tiu organizo (*vd p. 30*).

Krome, du pliaj alvokoj pri gravaj instruistaj eventoj ligiĝas al la temo: *vd* la alvokon de M. GROSJEAN pri la tutmonda kolokvo en Svislando (*vd p. 4*) kaj la konferencajn informojn de R. PETROVIĈ (*vd p. 38*). Ambaŭ ILEI-eventoj havas plurajn ligojn al la agado kaj celoj de Unesko. Bonan legadon!

Jozefo NÉMETH, redaktoro

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Mireille GROSJEAN: <i>Tria Tutmonda KOLOKVO pri Instruado de Esperanto</i>	5
Stefan MACGILL: <i>Gravas la kvalito de Instruista Trejnado (IT) – Unesko</i>	6
Ilona KOUTNY: <i>Kiel ĝi profesia kaj kvalifikita instruisto de Esperanto?</i>	11
<i>Kalendaro – Instruista Trejnado (IT)</i>	14
Mireille GROSJEAN: <i>Kursoj ↔ Paroligaj rondoj</i>	15
Raita PYHÄLÄ: <i>Defio por instruistoj: konsideri, trakti kaj taksi juste [...]</i>	17
Raita PYHÄLÄ: <i>Arto ne nur pro arto</i>	19
Mireille GROSJEAN: <i>ALTE-Konferenco</i>	20
<i>La efiko de KER-strategioj en la instruado de la angla [...] (intervjuo de MG)</i> ...	22
<i>Post Pluezek-staĝo (poemo de Gabrielle TRÉANTON kun notoj de MG)</i>	24
Zs. KÓRÓDY, E. KUKIELKA: <i>La tria renkontiĝo de trilanda Comenius-projekto</i>	26
Ronald GLOSSOP: <i>Nun ni devus efektiviĝi neglektitan revolucian proponon</i>	30
<i>El la landoj kaj sekcioj (BR, DE, HU)</i>	35
<i>Fotu nekutime!! (MG)</i>	37
<i>Korekto (JN)</i>	37
<i>47-a konferenco de ILEI, Montevideo (pliaj informoj de Radojica PETROVIĆ)</i>	38
<i>Informoj pri ILEI</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Unua vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Dua vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEJFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Tria Tutmonda KOLOKVO pri Instruado de Esperanto

(En la franca: „conférence”, en Esperanto „kolokvo”, ĉar ILEI okazigas ĉiun jaron Konferencon)

Historia noto

La unua tia Konferenco okazis en Ĝenevo, Svislando, en 1922, la dua en Prago, Ĉeĥoslovakio, en 1927.

Praktika noto

Tia evento devas esti lanĉita de Ŝtato. La invito iras de tiu Ŝtato al ĉiuj Ŝtatoj de la mondo. Ĉar en Svislando la kantonoj estas Ŝtatoj, ne nepras turni sin al Berno, la ĉefurbo. La registaro de la kantonu Neuchâtel decidis fari tian paŝon.

Nuna evoluo

Apogante sin sur la du rezolucioj de UNESKO kaj sur leĝpropono favora al Esperanto aprobita en 2009, la kantonu Neuchâtel decidis inviti ĉiujn ŝtatojn; en tiu svisa kantonu troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbu La Chaux-de-Fonds, kie ekzistas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urbuoj okazos la Kolokvo de la 13a ĝis la 16a de majo 2015, do en la fama jubilea jaro ESPERANTO UNESKO 60. Tiu agado kaŭzos, ke en ĉiun ŝtaton de la mondo venos al la registaro invitletero post dissendado de 180 leteroj la 30an de aprilo 2014. Do la registaro devos esplori, informiĝi, ĉu Esperanto estas instruata sur ĝia teritorio. Tio estas unu el la plej pozitivaj aferoj en tiu kolokvo.

Agado de la LIGO

ILEI estas la organizanto. Lingva aspekto: se la prelego estos en la franca, la teksto, projekciita sur ekrano aperos en Esperanto kaj inverse.

Celoj

Ĉi tiu konferenco celas analizi la nunan staton de la instruado de Esperanto en la mondo kaj esplori pri estontaj eblaj paŝoj:

- Kolekti prezentojn de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni.
- Kolekti prezentojn de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui.

- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto: lernhelpa efiko en la kampo de akiro de pliaj fremdaj lingvoj.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo.
- Esplori la eblojn firmigi la agnoskon kaj disvastigon de Eo en la diversaj instrusistemoj.
- Esplori, kiel kaj kiom Esperanto povas kontribui al la jarmilaj celoj de UN kaj UNESKO.
- Interŝanĝi spertojn.

La organiza komitato intencas inviti lokajn fakulojn, por ebligi interŝanĝojn inter movaduloj kaj la ĝenerala publiko. Do la enhavo de la diversaj prelegoj estos tre interesaj por iuj personoj, kiuj interesiĝas pri lingvoj.

Konklude

Tutcerte multaj esperantistoj partoprenos por sekvi tiajn altnivelajn interŝanĝojn. Ĉu la ŝtatoj sendos edukministron el la ĉefurbo aŭ sendos kulturalan ataŝeon, kiu dum la tuta jaro loĝas en Svislando, nenio certas. Ĉu ili entute interesiĝos pri tiu evento, eble jes, eble ne. Tamen la invito jam efikos informcele.

Mireille GROSJEAN

Prez de ILEI

Prez de la Kolokva Organiza Komitato

Gravas la kvalito de Instruista Trejnado (IT) – laŭ raporto de Unesko

Dokumento, kiu portas por ni utilan gvidon, estas la 11a jara raporto de Unesko el 2013, kiu havas la titolon: *'Instruado kaj lernado: atingi kvaliton por ĉiu'*. Ĉi tiu 477paĝa dokumento resumas la progreson kaj obstaklojn survoje al realigo de la proklamita celo liveri elementan edukadon al ĉiu infano sur la planedo ĝis 2015. Malsurprize tiu celo ne estos atingita, sed la raporto rakontas pri serio da pozitivaj atingoj. En la rubriko 'Malferme' de la revuo *Esperanto* mi resumis en unu paĝo la 54paĝan resumon (ED2013/WS/29) de la plena raporto – do ni komunikis la gravecon de

edukado kaj specife de instruisto-trejnado al la pli vasta movado. En *IPR* ni havas iom pli da spaco, do ni povas raporti pli plene pri la dokumento. En la nova retejo de *Esperanto* aperos eĉ pli ampleksa raporto. Do, kiu interesiĝas, iru tien.



Maldekstre: klasoĉambro sen tegmento, la tegmento estis detruita de pluvo kaj vento. (foto de www.ekantipur.com)

Unesko komisiis la raporto-pretigon al laborgrupo, kiu plenumis sendependan analizon de la situacio tra vasta gamo da landoj. La resuma raporto estas surprize facile digestebla, kaj prezentas en bone organizita maniero

multajn konkretajn datumojn kaj ekzemplojn por subteni siajn asertojn. Rilate la bazan celon ĝi raportis la gradon de malatingo: „Ankoraŭ nun 57 milionoj da lernejaĝaj infanoj ne povas aliri elementan lernejon entute. El tiuj, kiuj ja sukcesas, triono ne atingas fine de la ĉeestado bazajn kapablojn”.

La raporto trovis (nesurprize por instruistoj) proksiman korelacion inter atingoj de la lernantoj kaj la kvalito de instruista trejnado. Por ke la celo de universala bazgrada edukado ĝis 2015 estu atingebla, necesus varbi kaj trejni pliajn 1,6 milionojn da instruistoj. La financaj rimedoj por apogi tion malsufiĉas je 26 miliardoj da usonaj dolaroj jare.

La enkondukon de la raporto verkis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ino Irina BOKOVA, el Bulgario. Ŝi elstarigis kelkajn el la konkludoj de la raporto rilate al la rolo de instruistoj:

- Instruistoj devas speguli aŭ minimume koni la sociajn tavolojn de tiuj, kiujn ili instruas.
- Instruistoj estu trejnitaj kapabli helpi la plej malfortajn lernantojn.
- La plej efikaj instruistoj estu direktitaj al regionoj de la plej akuta bezono.

- Instruistoj ricevu stimulojn (financajn kaj spiritajn) por resti en la profesio kaj altigadu siajn lertojn.

Por bone roli, instruistoj bezonas subtenan kuntekston, kun bone konstruitaj studplanoj, efikaj taksaj strategioj por siaj lernantoj kaj si mem, kune kun ebloj pri plua tut-viva trejnado.

Ekde paĝo 13 la raporto traktas la gravecon de instruista kvalito, konstatinte, ke en plena triono de la landoj kun alireblaj datumoj, malpli ol 75% de la instruistoj ricevis ajnan nivelon de trejnado. Tiu pretigo koncernas ĉefe du kampojn: majstradon de la instruataj fakoj kaj la akompanajn pedagogiajn kapablojn. Tio estas aparte malfacila en landoj, kie la plimulto de la instruisto-kandidatoj mem ne povis ricevi multan edukadon. Pri la kvalitoj de tiu trejnado estas konkludite:

- Ke, ofte la trejnado konsistas el tro da teorio kaj nesufiĉe da praktiko, kun minimuma tempo pasigita en veraj klasĉambroj, sub mentorado de pli sperta instruisto.
- Ke ĝi malsufiĉe preparas kandidatojn por transvivi en izolitaj aŭ rimedomankaj situacioj (ekzemple kun neniu aŭ nefidebla elektroprovizo).

Gravas plie, ke la trejnistoj de la instruistoj mem vizitadu lernejojn por koni la realajn bezonojn kaj obstaklojn, kiujn frontos iliaj trejnotoj. Klare, instruistoj bezonas refreŝigajn kursojn kaj plutrejnadon dum la servado, ĉu per surlokaj sesioj, ĉu per distancaj rimedoj.

La raporto malmulte tuŝas lingvajn aspektojn de instruado; ĝi koncentriĝas pli al la graveco liveri edukadon al knabinoj (citante plurajn sociajn mezurojn, kiuj pro tio povas signife boniĝi, ekzemple la nivelo de dumnaskaj mortoj, de infan-geedziĝoj kaj -naskoj) kaj al malriĉaj junuloj kaj al tiuj kun lernmalfacilaĵoj. Tamen, ekde p. 40 ĝi notas la jenon:

’Por ke infanoj en etnaj kaj lingvaj minoritatoj akiru firmajn bazajn lertojn, lernejoj devas instrui laŭ la studplano en lingvo, kiun la infanoj komprenas. Dulingva instruado kun la daŭra uzo de la panjolingvo kune kun dua lingvo povas altigi la atingojn en tiu dua lingvo. Por mildigi lern diferencojn, dulingvaj programoj daŭru tra pluraj jaroj’. La raporto citas ekzemplojn, kie loklingva instruado donas pli bonajn rezultojn ol instruado nur en fremda lingvo.



Klaso en Benino (fotis Mirejo GROSJEAN)

La raporto notas (p. 17), ke el 150 landoj nur 41 elspezis pli ol 6% de la Bruta Nacia Produkto (BNP) por la eduka sistemo. El la tuta monsumo de internacia helpo, nur 1.4% estas dediĉita al edukado (p. 21). Se ĉiuj studentoj povus fini sian edukadon kun baza lego-kapablo, eblus tiri 171 milionojn da homoj el malriĉeco (p. 23). Pozitiva atingo: en Etiopio, junulara lego-kapablo kreskis je 34% en 2000 ĝis 52% en 2011 (p. 36). Malpozitive: 29 landoj ankoraŭ ne havas sufiĉajn instruistojn por elementaj lernejoj eĉ en 2030 (p. 38). Fine (p. 51) la dokumento resumas dek ĉefajn bezonatajn reformojn:

1. Ŝtatoj agu, por pli rapide forigi aŭ mildigi la mankon je sufiĉaj instruistoj.
2. Gravas allogi la plej bonajn kandidatojn al la profesio.
3. Trejnu instruistojn, por povi prizorgi la bezonojn de ĉiuj studentoj.
4. Pli bone pretigu la trejnistojn kaj mentorojn, por povi subteni instruistojn.
5. Direktu instruistojn al lokoj de la plej urĝa bezono.
6. Ofertu instigajn karierajn kaj salajrajn kondiĉojn, por reteni la plej bonajn instruistojn.
7. Bonigu la superrigardon de instruistoj; ne superŝutante ilin per ne-instruaj devoj.
8. Liveru al instruistoj novigitajn, modernajn instruplanojn, por bonigi lernadon.

9. Evoluigu rimedojn por pli efika lerno-taksado, por ke mankoj pli klare vidiĝu.
10. Akiru pli da datumoj pri la komunumo de trejnitaj instruistoj.

La emfazoj de la Unesko-raporto pri la kvalito de instruado en la mondo ja malfermas temon por ni esperantistoj – la sekva teksto baziĝas sur dua artikolo en *Esperanto* – do la mesaĝo eĥas tra la movado. La raporto substrekis la gravecon de adekvata stoko de bone trejnitaj instruistoj. Svarmas tra nia movado proponoj aliri politikistojn kaj edukinstancojn por akiri la rajton instrui Esperanton en lernejoj, devige aŭ laŭelekte. Tiaj petoj bezonus pli zorgan preparadon – ĉiam neglektata paŝo estas samtempe konkrete proponi subtenon por programo de instruista trejnado. Ni bezonas solidan grupon de instruistoj kapablaj apliki al nia lingvo modernajn teknikojn el la nuntempa lingvo-pedagogio. Tia plus-peto testus la veran sintenon de la politikistoj kaj edukistoj, ĉar tia programo kostus signifajn rimedojn kaj investojn, kaj realigus la infrastrukturon necesan por sukcesa kaj malefemera programo de E-instruado. Kiel diris nia pionira pedagogo d-ro István SZERDAHELYI okaze de la fondo de la katedro en la universitato ELTE en Budapeŝto: „Nun nia tasko estas instituciigi Esperanton.” Tion ni ne atingos per lozaj kaj izolaj aliroj; tiu instituciigo devas okazi multnivele, kaj devas inkluzivi koheran financotan programon de oficiale rekonata instruista trejnado.

La konturoj de la AMO-progrAMO por Aktivula Maturigo ĉe UEA nun firmiĝas kun intensa oferto (jam sep seminarioj en la fondo-jaro). Dezirindas simile intensa programo por instruista trejnado; la bezono same grandas. Iam ni revivigos la projekton MITE de ILEI (Modula Instruista Trejnado en Esperanto), kiu forfalis nur pro mankoj de financado kaj laborfortoj. MITE donus pli firman, varian kaj flekseblan kadron por la trejnado, kun ebloj atingi nivelon de oficialeco por la kursfinintoj. Ĝis tio stariĝos, gravas flegi la nunan oferton; ĝuste nun disiras informoj pri la oficiala 3jara 24kursa programo de postdiplomaj studoj pri interlingvistiko, kiu ekos en septembro 2014 ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Tiu kurso inkluzivas specialiĝon pri instruista trejnado; kelkaj stipendioj estos refoje ofertataj de UEA kaj ESF por faciligi la partoprenon de indaj studentoj. Informojn pri la kursaro kaj universitato vidu en la sama numero de *Esperanto* aŭ ĉe: <http://www.staff.amu.edu.pl/~inter/> [Vidu paĝon 11 en ĉi tiu numero!]

ILEI ofertas ekde julio 2014 trejnprogramon sub la nomo Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP). Tio konsistas el du sinsekvaj semajnoj da intensivaj kursoj en la Interkultura Centro Herzberg pri lingvokono kaj metodiko de instruado, inter la 19a kaj 26a de julio kaj inter la 27a de julio kaj la 3a de aŭgusto. La du kursoj havos iujn komunajn elementojn kaj kelkajn unikajn. Eblas aliĝi por iu ajn el la unu-semajnaj kursoj, aŭ al ambaŭ. Vidu ĉe <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=92783725>.

[Vidu la kalendaron IT en paĝo 14.]

Progresadas la programo de distanca trejnado, RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe www.edukado.net), kiu ankaŭ havas stipendiajn alirojn. Ĝi ofertas mentoratan trairon de stud-moduloj, kun multe da apoga vidbenda materialo, interalie el registritaj modellecionoj. Vd. ĉe <http://www.edukado.net/klerigejo/rite/celoj>

Instruista trejnado kaj aktivula maturigo; jen du kampoj, kiuj respondas al la bezono por konkretaj projektoj, kiuj realigas la celojn de la Strategia Plano. Tre gravas reale ligi ĝiajn ambiciajn stratosferecajn celojn kun agado en ternivela atingo de niaj membroj kaj agantoj. Se ni momente renomos la programon AMO, jen utila duopo: Aktivula Trejnado (AT) kaj Instruista Trejnado (IT). Ĉu eble venis la tempo por restarigi novan (kaj espereble pli produktivan) formon de la iam furora ATA-ITA debato?

Stefan MACGILL

Vic-prezidanto de UEA

Kiel iĝi profesia kaj kvalifikita instruisto de Esperanto?

La Interlingvistikaj Studoj (IS) de UAM donas solvon

La KER-ekzamenoj furoras. Kial multaj submetiĝas al ĝi malgraŭ tio, ke nenies salajro altiĝos poste? Ĉar oni volas plialtigi sian lingvoscion pretiĝante al ĝi, mezuri ĝin kaj montri al la mondo, ke ankaŭ el Esperanto eblas fari internacie rekonatan ekzamenon. Instruantoj de Esperanto aŭ tiuj, kiuj intencas tion fari, eĉ pli devus profundigi kaj larĝigi siajn sciojn. Instruisto devas esti preta respondi al diversaj demandoj de siaj gelernantoj, scii multe pli ol la bazan programon.

Ne sufiĉas bone scii E-on, se iu volas instrui ĝin en lernejo; la oficiala atestilo, kiun donas ŝtata universitato, estas baza afero.

La pola Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano jam de 1998 regule ofertas siajn **3jarajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio** en ekstera formo: nur unu intensan semajnon necesas pasigi en UAM ĉiusemestre; inter la sesioj la laborado okazas kun la helpo de la kursgvidantoj kaj per reta lernado. La tria jaro ebligas **specialiĝojn**: pri internacia kaj interkultura komunikado, interlingvistiko, lingvistiko kaj literaturo de Esperanto, tradukado kaj instruado. La lasta estas tre grava kaj la plej altnivela **formado de Esperanto-instruistoj**.



Vi povas diri, ke la **gramatiko** de Esperanto estas simpla, ja ĝi konsistas nur el 16 reguloj, do kial studi en universitato? Aliflanke ni havas la dikajn PAG kaj PMEG kun multaj specialaĵoj de planlingvo, kiu iĝis natura pro la uzo en parolkomunumo. Ekzistas eĉ tiaj problemoj – kiel la radikarkaractero aŭ la -ata/-ita uzo – kiuj akre diskutigas esperantistajn lingvemulojn. Dum

la studoj vi povos ekkoni la tiklajn demandojn kaj respondojn en pli larĝa lingvistika kunteksto kaj entute akiri lingvistikajn bazojn.

La Esperanta **literaturo** ludis gravan rolon jam ĉe la ekvivo kaj dum la evoluo de la lingvo. La verkado daŭre stimulas multajn kontribuoj al la E-literaturo. Sed kiuj estas la gravaj literaturaj verkoj? Vi ricevos larĝan panoramon de la E-literaturo en IS de kompetentaj prelegantoj. Ankaŭ la turnopunktoj en la **historio** de la E-movado estos prilumigitaj. Pluraj aspektoj de la Esperanta kulturo ĝis modernaj aplikoj de E-o en komputa lingvistiko aperas en la programo.

Esperanto ekestis kiel solvo por **internacia komunikado** en multlingva mondo, kaj kolektiĝis multaj spertoj en tiu funkcio, ne eluzitaj. La problemoj eĉ hodiaŭ ne estas solvitaj, kvankam la angla pli kaj pli arogas al si tiun rolon. Vi povos studi diversajn planlingvojn kaj analizi la nuntempan internacian lingvopolitikon. Ni esploros, kiun rolon Esperanto povas plenumi en la internacia kaj interkultura komunikado.

La kono de ĉi tiuj terenoj estas bezonata ankaŭ de multflankaj instruistoj. La tria jaro ebligas specialiĝon pri **instruado de Esperanto** – kunlabore kun ILEI kaj www.edukado.net – kie vi akiros sisteman superrigardon pri la instrua procezo kaj detalan metodaron de instruado de Esperanto en aktiva formo. La riĉa programo prezentos interalie ankaŭ la instruhelpilojn (instruista kofro), la modernan teknologion en instruado (retkursoj), la organizadon kaj planadon de diversaj kursoj.

DO, se vi volas havi solidan bazon pri esperantologio, larĝajn fonajn sciojn pri internacia kaj interkultura komunikado, fidindan metodikan pretiĝon kaj oficialan atestilon de ŝtata universitato, tiam estu bonvena dum la unua sesio de la Interlingvistikaj Studoj

*Ilona KOUTNY,
prof. de UAM, membro de AdE, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj*

Informoj troviĝas sur la retpaĝoj de IS: <http://www.amu.edu.pl/~interl/> kaj peteblas ĉe: interlin@amu.edu.pl.

Aliĝu rapide, sed plej malfrue ĝis la 15-a de aŭgusto 2014!

Haveblos kelkaj stipendioj.

Kalendaro – Instruista Trejnado (IT)

19 julio – 03 aŭgusto 2014

Herzberg am Harz, Germanio

2-semajna intensa lingvolernado, metodika trejnado kaj instruista kapablado sub la gvido de Zsófia KÓRÓDY

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

22 septembro 2014 – septembro 2017

Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando, kun specialigo pri pedagogio sub la gvido de Ilona KOUTNY.

interlin@amu.edu.pl, <http://www.amu.edu.pl/~inter/>

24 septembro – 28 septembro 2014

Poznań, Pollando

Interlingvistika simpozio sub la gvido de Ilona KOUTNY kaj staĝo ARKONES

Aliĝu ĉe tobiasz@esenco.org

29 septembro – 05 oktobro 2014

Herzberg am Harz, Germanio

Torpedo 9 – Pedagogiaj tagoj, seminario, metodika trejnado sub la gvido de Zsófia KÓRÓDY

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

7 oktobro – 10 oktobro 2014

Kameoka apud Kyoto, Japanio

4a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)

Kapablado de instruistoj

Aliĝu ĉe [Ishikawa Chieko, isksanjo@ff.e-mansion.com](mailto:ishikawa_chieko@ff.e-mansion.com)

07 – 16 novembro 2014

Herzberg am Harz, Germanio

Intensa lingvolernado kaj metodika trejnado

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

12 – 21 decembro 2014

Herzberg am Harz, Germanio

Intensa lingvolernado, metodika trejnado kaj fakseminario

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

27 aprilo – 03 majo 2015

Herzberg am Harz, Germanio

Intensa lingvolernado, metodika trejnado kaj fakseminario

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

13 majo – 16 majo 2015

Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto

Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, (Svislando)

Diversaj prelegontoj (konfirmota) Ilona KOUTNY (Pollando), Katalin KOVÁTS, (Nederlando), Peter BALAŽ, (Slovakio), Angela TELLIER, Essex (Britio), Zsófia KÓRÓDY (Germanio) kaj aliaj.

Aliĝu ĉe mirejo.mireille@gmail.com

22 – 31 majo 2015

Germana Esperanto-Kongreso kun fakseminario, trejnado en Hameln

postkongreso kaj seminario en Herzberg am Harz

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

03 – 17 julio 2015

Herzberg am Harz, Germanio

Antaŭ la ILEI-konferenco: 2-semajna intensa lingvolernado, metodika trejnado sub la gvido de Zsófia KÓRÓDY

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

17 – 25 julio 2015

Oostende, Belgio

Tutsemajna Konferenco de ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Kurso por instruistoj sub la gvido de Katalin KOVÁTS kaj Mireille GROSJEAN

Aliĝu per www.ilei.info

Kursoj ↔ Paroligaj rondoj

Aliaj travivaĵoj, aliaj lernsituacioj

Kurso (ĉeesta kurso) okazas per lerncela kunveno de instruisto kaj lernanto, lernantoj.

La instruisto preparas la kurson per la elekto de la lernocelo, kiu konsistos el iu aspekto de la lernenda lingvo. Tiu gvidanto elektos la strategiojn, kiuj ebligas al la lernantoj malkovri tiun parton, akiri tiun aspekton; povas esti



plej diversaj taskoj, kiel legado, ekzercoj, tradukoj, demandoj – respondoj k.s. povas esti parolaj aŭ skribaj aktivajtoj. La instruisto korektas la produktajtojn de la lernantoj, tion, kion ili diras, prononcas, skribas, respondas, tradukas... Pri la diversaj manieroj korekti pozitive kaj kuraĝigante venos alia artikolo.

Dum paroligaj rondoj la celo estas praktiko de la lingvo sen skribado, sen tradukado. Kompreneble akiro de scioj, kompreno de lingvaj fenomenoj povas okazi, sed tio ne estas la celo. La celo de tiaj kunvenoj estas trejnado de aŭskulta kompreno kaj de parola produktado, kaj de ambaŭ samtempe en adekvata interparolado. Tio estas necesa, ĉar tio ne fontas el racia pensado, sed el aŭtomataj refleksoj, kiuj devas funkcii rapide. Same kiel en kurso dum tiu kunveno estas gvidanto. Tiu persono preparos aktivajtojn cele al paroligado de la studentoj. Povas esti improvizado, skeĉoj, demandoj-respondoj, rolludoj k.s. Spontaneco gravas. Do la instruisto ne instruos, ne prelegos. Estas defio por la lernanto: mastrumi samtempe la enhavon de la diraĵoj kaj la gramatikon... post aŭskultado de demando tuj formuli adekvatan respondon... Pro tio dum la parola aktiveco la gvidanto ne devas interveni iel ajn, ekz. korektante eventualajn erarojn. Se li / ŝi tion farus, tio bremsus la parolfluon de la lernanto. Mense la studento irus al gramatiko kaj perdus la fadenon... eble li / ŝi ŝatos ĉesi...devos honti... intencos forlasi la salonon... Estas malfacile por instruisto silenti, ne reagi, ne movi iun vizaĝoparton, ne frapeti surtable per nervozaj fingroj, aŭskultante eraron ĉe la improvizanta lernanto. Tamen li / ŝi devas.

En tiaj situacioj povas okazi du specoj de eraroj. La unua speco estas dumprodukta eraro; la studento bonege konas la uzon de la finaĵo –n por la objekto ekzemple, tamen forgesas ĝin pro pripensado pri la sekvo de la skeĉo, pri la enhavo de la teatraĵo. Por tiaj eraroj ne endas ion diri. Korektado estas superflua. La lernanto fakte aŭdas la eraron samtempe, kiel la publiko, sed la vorto jam forlasis lian / ŝian buŝon... ne plu eblas repreni ĝin... Foje la persono rediras la frazon ĝuste, por montri, ke li / ŝi konas tiun frazkonstruon. Aliaj eraroj povas montri al la instruisto, ke tiu lernanto

ankoraŭ ne komprenis tiun aŭ jenan punkton de la gramatiko. En tiu momento la instruisto notu la eraron rapide kaj diskrete. Foje okazas, ke la gvidanto povas sugesti pli trafan vorton. Li notu tion. En posta fazo, ekster la paroliga rondo, post ĝi, tiu gvidanto dediĉu tempon al la bezonataj klarigoj por tiu studento, eble en plena kunsido, eble en dupersona momento. El tio oni komprenas, ke dum paroligaj rondoj la gvidanto havu paperon antaŭ si por noti.

Tiaj paroligaj rondoj ofte estas malagrablaj por la studentoj. Jes ja, ilia kapo plenas je ideoj, kaj iliaj lingvaj kapabloj ebligas al ili esprimi nur parton, parteton de tiuj abundaj, detalaj, trafaj ideoj. El tiu diferenco naskiĝas frustrado. Do ĉu tiaj trejnaj kunvenoj vere indas? Kompreneble jes. Okazos jeno: la studento sentos siajn mankohavajn lingvokonojn kaj havos fortan deziron progresi. Do tiu frustrado efikos kiel puŝo, stimulo.



Mireille GROSJEAN
fremdlingvoinstruisto dum 38 jaroj

Defio por instruistoj: konsideri, trakti kaj taksi juste ĉiujn lernantojn

Kvankam la rezultoj en la PISA-enketo¹ flatis Finnlandon, ili ne montris grandan diferencon inter la rezultoj de elorigine finnaj lernantoj kaj la rezultoj de la lernantoj devenintaj el aliaj landoj, precipe el enmigrintaj familioj kun t.n. „etna fono”. Tiuj du vortoj kutime signifas „evolulando” aŭ „orienta Eŭropo”. La diferenco estas hontinde pli granda ol en aliaj eŭropaj landoj. La scioj de infanoj el „etna fono” ofte respondas al tiuj de

¹ *Programme for International Student Assessment* (programo por internacia studenta taksado)

infanoj 2-3 jarojn pli junaj ol ili, do en klaso 2-3 jarojn malpli alta en la lerneja skalo. Kvankam Finnlando famas pro tio, ke ni povas subteni kaj helpi infanojn, kiuj progresas pli malrapide ol iliaj samklasanoj, tio ne koncernas la alilingvan lernejanaron (finna kaj sveda estas niaj du enlandaj oficialaj lingvoj). La alilingva lernantaro rapide kreskas, nun el la bazlernejanaro 7-15-jaraĝa ĝi atingas 4,8 procentojn, t.e. 25 437 lernantoj en 2012. Pri ilia malbona progreso oni povas kulpigi ankaŭ instruistojn, kiuj ne atendas bonajn rezultojn de la alilingvaj infanoj. La finnajn/svedajn lernantojn la instruistoj kuraĝigas, spronas kaj instigas al plia klopodado, sed ili ne postulas la saman nivelon de infano el aliaj kultura fono kaj lingvo. Male, la instruisto kontentas kaj eĉ dankas, se la noto de tia infano estas „mezgrada”. La abituriento Naima Farah, kiu venis el Somalio al Finnlando en la aĝo de 12 jaroj sen scii eĉ unu vorton de finna lingvo, nun posedas 4 lingvojn kaj deziras fariĝi kuracistino. Ŝi aperigis sian vidpunkton en finna gazeto dirante, ke kelkaj enmigrintaj familioj ne aprezas la edukadon, sed aliaj komprenas, ke, por ke la infano dungu kaj prosperu, nepras bonaj edukado, rezultoj kaj atestoj. Ŝi deziras, ke la instruistoj ne tro indulgu la infanojn de enmigrintoj, sed helpu kaj spronu ĉiujn al pli bonaj rezultoj.

La signifon de la etna fono en lernado oni nun esploras en Finnlando. La esploro estas unu el la unuaj en la PISA-landoj. Finnaj instruistoj devos esti pli edukataj pri interkulturaj scioj kaj diferencoj. Pri multkultureco oni neniam povos esti plenklara.

Alia afero estas, ke en la socio malaperas kaj malaperos metioj kaj profesioj, precipe tiuj kun mezgrandaj salajroj. Tial oni rekomendas edukadon pri pluraj fakoj kaj elastecon en la laborelektoj. La labormerkaton karakterizas granda ŝanĝiĝemo. Neniu kapablas plene prognozi la estontecon. Maŝinoj, komputiloj anstataŭas laboristojn, entreprenoj serĉas landojn, kie la salajroj estas plej eble malaltaj, aŭ dungas homojn el tiaj landoj en Finnlando. Jen kelkaj fakoj, kie homa laboro kaj intelekto eble ne povos esti anstataŭigita per io alia: kuracisto, flegisto de malsanuloj aŭ maljunuloj, kuiristo, aŭtoriparisto, gardisto, instruisto, vendisto, kelnero, inĝeniero, juristo, frizisto, barbiro, ŝoforo de remorkhava kamiono, purigisto. Resume, la laborpostenoj en la estonteco troviĝos en flegado kaj zorgado pri homoj, servado al homoj, terapio, elpensado de novaj ideoj kaj evoluigado de produktoj. Krome, praktikaj fakoj, kie bezonatas lertaj manoj, ĉiam estos aprezataj.

Raita PYHÄLÄ (Finnlando)

Arto ne nur pro arto



La Finnlanda Edukministerio kun la urbo Hyvinkää zorgas pri la artocentro *Villa Arttu*, kiu disponas pri cent mil artaĵoj faritaj de infanoj kaj gejunuloj en 130 landoj konkursocele. 66% el tiu trezoro estas videblaj ciferece en la reto, kun finnaj kaj anglaj sciigoj. La bildoj povas esti uzataj por komenci interparoladojn de homoj

en malsamaj kulturoj kaj aĝoj. La temoj inkluzivas multon priparolindan: hejmo, patrino, ĉiutaga vivo surstrate kaj aliloke, ludoj kaj ritaroj, niaj futuro kaj nuno. La vizitantoj en la artocentro aŭ ĉe siaj komputiloj estas instigitaj al komparado de kutimoj kaj vivkondiĉoj, al interkompreniĝo de nia multfaceta, bela, maljusta mondo. La konkurso en printempo 2014 temas pri manĝaĵoj kaj manĝokutimoj. En oktobro la artocentro starigos surmuran ekspozicion pri la konkursaĵoj. Poste, la ekspozicion oni sendos al Helsinki, la finna ĉefurbo.

La vasta kolekto ekis pro ideo de la instruisto kaj artisto Eino VESALAINEN (1923 – 2010). Lia revo estis eduki gejunulojn kaj infanojn al paco kaj kultura interkompreniĝo per arto.

Pliaj informoj pri la artocentro *Villa Arttu*

La centro uzas la grandajn laborejojn de antaŭa lanfabriko por helpi gejunulojn kaj infanojn lerni kaj progresi en siaj artaj ŝatokupoj: desegnado, pentrado, skulptado, ceramiko, gravuraĵoj, nigra-blankaj fotoj, videofilmoj kun sono. Profesiaj artistoj instruas pri ĉiu fako. Gepatroj kun beboj kaj etuloj partoprenas t.n. kolorbanojn, geavoj kaj genepoj oleopentras kaj akvarelas kune. Estas aranĝataj instruhoroj pri bildstrioj kaj 'mangao'. La ekspozicioj sur la muroj fontas el la stoko de la artaĵoj de infanoj kaj gejunuloj laŭ elektitaj temoj. Se estas ekspoziciataj pentraĵoj ekzemple pri

cirko, junaj vizitantoj povas lerni akrobatadon, saltojn kaj transkapiĝojn sur dikaj tapiŝoj aŭ matraco. Ili lude aĉetas biletojn ĉe cirkogiceto, fotigas sian vizaĝon en truo de cirkeca ekrano, ridas pro klaŭnovestaĵoj sur ŝnuro, elkore amuziĝante. De la artocentro profitas ne nur unuopaj vizitantoj sed ankaŭ lernejoj kun siaj instruistoj, enmigrintoj, turistoj, kiuj emociiĝas vidante bildojn pri siaj devenlando kaj kulturo. Ofte ili povas vorte klarigi, pliprofundigi kaj plidetali la enhavon de la bildoj.

Vidu www.artcentre.fi.


(Surfote: Rondirado en la artocentro – foto de Raita Pyhälä)

Raita PYHÄLÄ (Finnlando)

ALTE-Konferenco

ESPERANTO ĉeestis

Parizo, la 10an kaj 11an de aprilo 2014



„Association of Language Testers of Europe”, jen tio estas ALTE: Asocio de taksistoj pri lingvoj en Eŭropo. Do tiu asocio grupigas lingvoinstruistojn kaj okupiĝas pri taksado, ĉu laŭ la KER-sistemo (Komuna Eŭropa Referenckadro) ĉu laŭ aliaj ŝtataj aŭ ne ŝtataj sistemoj. En tiu asocio membras UEA.

Partoprenis 360 personoj el 60 landoj. La partoprenantoj venis el Japanio, Ĉinio, Tajvano, Sud-Ameriko, Afriko, Kanado. La Komuna Eŭropa Referenckadro ne plu estas eŭropa, ĉar en ĝi estis agnoskitaj la korea lingvo, la ĉina, la japana, la araba kaj Esperanto. Dum la Konferenco prelegis partoprenantoj el 30 landoj en diversaj lingvoj: la angla (en), la franca (fr), la germana (de), la hispana (es). Interkrampe

legiĝas la oficialaj mallongigoj por la lingvoj laŭ ISO. Ne aperis partoprenlisto.

La temo de la Konferenco estis „Taksado pri lingvoj por multlingvismo. Kuraĝigi al lingva diverseco kaj interkultura komunikado”. Enhave la diversaj kontribuoj traktis tiun temon kaj ĉiuj prelegantoj subtenis multlingvecon. Tamen mi povis observi, ke, kiam venis ia amuza rimarko en la franca, la publiko ridis post kelkaj sekundoj, kiam ili aŭdis la tradukon al la angla. El tio mi povis scii, ke la plej granda nombro de la partoprenantoj parolas nur la anglan kaj uzis interpretadon por kompreni la malmultajn prelegojn en la franca aŭ en la germana aŭ hispana.

La prelegoj estis tradukitaj al gestolingvo, pli precize al gestolingvoj: unu persono uzis gestolingvon de la angla, alia uzis gestolingvon de la franca. (*Vidu la apudan foton*).

Mi povis konstati, ke urĝas promocii gestolingvon internacian. Jen tasko nia!

Mi plurfoje partoprenis debaton per demando aŭ komento, ĉiam post klariga enkonduko: „Mi nomiĝas Mireille GROSJEAN, mi reprezentas Universalan Esperanto-Asocion”. Mi povis disdoni multajn informilojn kaj ekriklari kun multaj personoj.

Mi parolis kun Profesoro NEGISHI el Tokio, kiu prezentis la diversajn aspektojn de la uzo de la KER-sistemo por la taksado de la akiro de la angla en Japanio. [*Vidu artikolon sur p. 22*]. Amuze estis, kiam mi parolis al li pri samideano KIMURA Goro Christoph, profesoro en Sophia Universitato en Tokio, ĉar ili konas unu la alian. Mi aŭdis tre interesan prezenton de Profesoro Piet VAN AVERMAET el la universitato de Gent, Belgio. En sia prezento li emfazis la multnombrian malsaman originon de la enmigrintoj, la buntecon de la lingvoj, la diversajn kaŭzojn de migrado, la gravecon de aliro al tiu nova situacio laŭ socia kaj civitana manieroj, kiuj ofte ne kongruas kun la kutimaj lingvopolitikaj decidoj kaj praktikoj. Mi parolis al li kaj ni skizis, ke iu el lia esplorgrupo povus partopreni nian simpozion dum la ILEI-Konferenco en Oostende en 2015. Same mi faris kun Profesoro Jozef COLPAERT de la antverpena universitato; li estas fakulo pri perkomputila lernado de lingvoj. Li prelegis pri necesaj adaptoj de la KER-sistemo post konsideroj de uzantoj. Evidentiĝis, ke la Konsilio de Eŭropo



lanĉis la KER-sistemon, kaj ke nun ALTE sekvos la evoluon kaj agados pri ĝi. Pluraj prelegantoj emfazis, ke la interkulturaj kapabloj enorme gravas kaj ke la pure prilingva kapablo ne sufiĉas en la profesia vivo.

ALTE proponis konkurson, kies premioj estis senkotiza partopreno al la Konferenco. El pluraj kandidatiĝoj 6 junuloj partoprenis la konkurson, sendis kandidatan leteron kaj gajnis la partoprenon. La unua premio estis komplete senpaga partopreno, kun repago de vojaĝkostoj kaj restadkostoj; tiun gajnis junulino el Vjetnamio. Mi povis paroli kun ŝi, gratuli ŝin kaj prezenti al ŝi E-on menciante la vjetnaman movadon. La universitato de Cambridge (UK) same donis stipendion al unu persono. Tiuj stipendioj estis unuafoje disdonitaj.



Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

La efiko de KER-strategioj en la instruado de la angla en Japanio

Intervjuo de Profesoro NEGISHI Masashi, Tokio

Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) jam de longa tempo ne plu estas nur eŭropa: aliĝis al ĝi la araba lingvo, la korea, la ĉina, la japana kaj E-o.

Profesoro NEGISHI instruas en la Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj. Li estas lingvisto, publikigis diversajn verkojn kaj lernolibrojn kaj observas la uzon de KER en Japanio en la instruado de la angla. Li membras en la Eduka Komitato pri la fremdlingva instrupolitiko ligita al ŝtata Edukministrejo. Intervjuis lin Mirejo GROSJEAN en Parizo dum la Konferenco de ALTE (Association of Language Testers of Europe / Asocio de lingvaj taksistoj en Eŭropo) la 10an de aprilo 2014.

Mir: Altestimata! En via prelego vi asertis, ke okazas kolizio inter la KER-postuloj kaj la japana kulturo. Ĉu vi povas priskribi tion?

Prof: La problemo kuŝas en la fakto, ke la KER-skemo tekstas: „mi kapablas”, „mi sukcesas”. Tiel oni ne diras en Japanio, tia frazo ne uzatas. Se tia demando venas, venos respondo: Ne. Pro tio ni devis en Japanio adapti la KER-sistemon al nia mondo. La nomo estas CEFR-J.

Nia unua paŝo estis krei pliajn nivelojn. Do ni havas pli ol la 6 konatajn nivelojn de KER. Nia dua paŝo estis verki konkretajn ekzemplojn por la instruistoj, kiuj uzos la KER-skemon. Do se la KER-skemo esprimas ian abstraktan ĝeneralan kapablon, ni verkis precizajn frazojn „Mi kapablas diri: Leviĝu! Venu!...”. Tion legas la instruistoj, tio estas helpo al ili.

De jardekoj la celoj de fremdlingvoinstruado en Japanio estas legado kaj skribado. Mankas parolado kaj aŭskulta kompreno. Se la instruisto tamen volas trejni siajn lernantojn pri parolkapablo, li / ŝi donas ian temon kaj la lernanto devas prepari prezentadon. Do la studento parolas, sed ni ankoraŭ ne estas en spontana diskutado, kie endas reagi al demandoj kaj trovi respondojn, argumentojn, rimarkojn. Eble eĉ la instruistoj mem malfacile povus partopreni en improvizaj diskutoj... Do la postuloj de KER, kiuj enhavas la 4 kapablojn, malkongruas kun la japanaj instrukutimoj. Temas pri granda defio por la instruistoj eniri tiun novan sistemon eŭropdevenan.

Kutime iu homo pensas kaj duapaaŝe parolas. Japanoj ofte rezignas pri la dua paŝo: ili pensas, kaj silentas. La daŭro por atingi la ekparoladon estas proksimume unu jaro. Plie japanoj ne kutimas paroli pri si mem. Do tie denove okazas malkongruo kun la postuloj de KER „Ĉu vi faras tion? Ĉu vi ŝatas tion?...” Por paroli klare: la instruistoj devas labori kiel interfacio, kiel perantoj, inter la KER-postuloj reformulitaj en CEFR-J kaj la studentoj. Ili devas baki tion laŭ japana kuirarto, komunikmaniero. Oni povas konstati, ke la uzo de KER kaŭzas plian ŝarĝon por la geinstruistoj, kiuj kutime intruas en klasoj el proks. 40 lernantoj.

Mir: Mi kore dankas vin. Mi ŝatus aldoni jenan konstaton: Kiam mi alvenis unuan fojon al Japanio, mi kutimis ekparoli en iu butikoj aŭ surstrate al japanoj per la demando (en la angla) „Ĉu vi parolas la anglan?” Ĉiam mi ricevis la respondon: „Ne!”. Poste mi pripensis pri tiu ne ebla komunikado kaj provis per alia strategio dirante (en la angla): „Mia lingvo estas la franca. Mi iomete parolas la anglan. Ĉu ni povus komuniki per la angla?” Tiam venis respondo: „Jes!”

Prof: Interese!

Mireille GROSJEAN

Ne nur gramatiko

Ne nur gramatiko
laŭtlegado
korektoj
ekzercoj
konjugacioj



konsistigu kursojn.

Gravas gaja etoso

socia aspekto
agrabla momento
pozitiva korektado
partopreninda kun-veno.

Post

tutsemajna staĝo
lerncela kunloĝado
freneza kongreso
venas soleco, sopiro, tristeco, melankolio, spleno.

Tion belege esprimas Gabrielle TRÉANTON (1920), 94jara en 2014.

Ĝuu ŝian apudan poemon... →

Noto: Ne grumblu al ŝi pri „Revenu venontjar’’. Ŝi scias, ke tio estas eraro. Tamen ŝi uzis tiun formon... Ŝi havu la rajton...

Post
Pluezek..staĝo

Dezerta la placo Ne ploru, la kor'
Ne ploru, la kor' Ĉar ĉiuj foriris
Hieraŭ plenplena Kun granda hezoro
Hodiaŭ nudega de sperto
Dezerta la placo kaj de amikec'
Sen homo, sen auto Ĉar ĉiuj rikoltis
Foriris la sun' La fruktojn de staĝ'
Revenis la pluv' kaj baldaŭ disdonis
Somere hieraŭ la valorajn semojn
Aŭtunas hodiaŭ Ne plu ploru, ĉiel'
Foriris Andreo Ĉar venos la revid'
Foriris Roberto Sed gardatu memor'
Foriris Terezo De la ĝojega staĝ'
Kaj ankau Mramba Revenu venontjar'
Finita la staĝo Ne plu ploru, ĉiel'
Ĉiuj estas for' Ĉar survoje perdiĝis
Plorus mia kor' Mia nov'pluvombrel'.

Gaby TREANTON oktobro 2007

La tria renkontiĝo de trilanda Comenius-projekto

La kadro

Post la vizitoj en Mazara (IT) en aprilo 2013 kaj en Győr (HU) en septembro 2013 la trian fojon renkontiĝis 12-18-jaraj mezlernejaj lernantoj el Italio, Hungario kaj Germanio kadre de Comenius-projekto. La ideo de la projekto venis de la germana partnero kaj baziĝis sur antaŭaj studoj dum la ĉiu-semajnaj Esperanto-lecionoj gvidataj de Zsófia KÓRÓDY en la Ernst-Moritz-Arndt Gimnazio en Herzberg am Harz. La projektdetalojn ŝi ellaboris kun Ewa KUKIELKA, subtenate de Peter ZILVAR de la E-Centro, kiu antaŭ kelkaj jaroj, inter 2008 kaj 2010, estis projektpartnero kun la Nicolai-bazlernejo el Herzberg de same trilanda Comenius-projekto (kun Springboard-lernejo en Bar Hill (UK) kaj baza lernejo en Miskolc (HU)).



Urborigardado en Herzberg, ĉe Zamenhof-monumento

La strukturo

La projekto kun la titolo „De la loka kastelo al la Eŭropa Domo” havis dujaran laborplanon inter aŭtuno 2012 kaj somero 2014: por ĉiu monato por ĉiu partnero estis difinitaj taskoj kaj okazis tri reciprokaj unu-semajnaj vizitoj al la partnerlandoj por konatiĝi unu kun la aliaj kaj prezenti ne nur por la partneraj grupoj sed laŭeble al la tuta lernejo la projektenharon, plenumitajn taskojn, prezentadmateriojn.

La dumjara kontaktado okazis per sendado de fotoj, bildkartoj, salut-mesaĝoj, leteroj, pakaĵetoj, per regulaj personaj kontaktoj tra komuna fermita Facebook-grupo, per uzado de Skajpo inter la projektgvidantoj. La informoj, produktoj, fotoj, filmoj ktp. aperadas sur 4-lingva (Esperanta, germana, hungara, itala) hejmpaĝo. Ni antaŭvidas eldonon de DVD-disko kun riĉa enhavo kaj pretigos libreton, kvazaŭ gvidlibreton por junaj ĉiĉeronoj, turismaj helpantoj.

Dum la partneraj vizitoj gravan rolon ludis la gepatroj, kiuj gastigis po unu lernanton el ĉiu partnerlando. Tio donis apartan eblon por internacia kontaktado, kunvivado, kunlaboro kaj komunikado kaj rezultigis ekeston de vera amikeco inter la gejunuloj.

La enhavo

Dum du jaroj grupoj de lernantoj el la tri lernejoj partoprenantaj en la projekto lernis Esperanton kaj kolektis diversajn materialojn pri sia propra lernejo, ĝia nomdonanto, lokaj geografio, historio kaj legendoj, lokaj gravuloj, famaj historiaj personoj, tradicioj, festoj de la regiono, turismaj vidindaĵoj, najbaraj urboj kaj ĉirkaŭaĵoj por montri ilin al samaĝuloj loĝantaj eksterlande. La preparitaj prezentadoj, filmetoj kaj fotoj estis interŝanĝataj per interreto kaj dum la projektaj renkontiĝoj la gejunuloj lernis kiel gvidi junajn turistojn tra sia propra urbo. Ili lernis pri la plej gravaj kaj interesaj vidindaĵoj, vizitis muzeojn, trastudis turismajn broŝurojn, gvidlibrojn. Parto de la rezultoj de ilia laboro kun aldonaj informmaterialoj ricevitaj el la aliaj landoj estis prezentitaj ankaŭ en la formo de ekspozicioj, ĉu porokazaj antaŭ- aŭ post la vizitoj, ĉu sur murtabuloj aŭ en konstanta vitrino en la koridoro de la lernejo, kie ĉiuj povis rigardi ilin, lerni per ili pri aliaj landoj, regionoj kaj sperti, kion signifas internacia kunagado inter samaĝuloj.

La vizitoj

La unua renkontiĝo en Mazara del Vallo en aprilo 2013 estis tre grava, ja la unuan fojon la lernantoj vidis unu la alian, devis konatiĝi, integriĝi en nekonatan ĉirkaŭaĵon, lerni esti parto de nova familio, alktimiĝi al aliaj lernejoj, sociaj kondiĉoj. Ne nur la bela vetero sed ankaŭ la multaj historiaj vidindaĵoj, la marbordo kaj la palmoj, la vizititaj regionoj restos en la memoro. Dank' al la gastamo de la siciliaj familioj, la agademo de Angela CRISTALDI, la lernejestrino, kaj koleginoj Caterina GAGLIANO kaj Francesca ASARA kune kun la zorgemo de la instruistoj el Hungario kaj Germanio, la unuaj impresoj estis tre pozitivaj kaj la projektsemajno sufiĉis por krei la amikajn rilatojn, kiuj akompanis la tre harmonian kunlaboron dum la tuta daŭro de la projekto.

La dua vizito al Győr en septembro 2013 aldonis al la grupoj novajn defiojn: provi solvi projekttaskojn en miksitaj grupetoj laŭeble per helpo de Esperanto, kaj se ne eblis, kun klarigoj, tradukoj al la aliaj lingvoj. Post ekzercado ĉiuj grupetoj sukcesis produkti la bezonatan materialon, ekestis vortaretoj pri turismo kaj pretiĝis filmitaj scenetoj, dialogoj inter 'turistoj' kaj 'informantoj'. La ekskursoj al famaj lokoj, ekz. Komárom, Pannonhalma, konatigis la lernantojn kun la hungara historio, la dumsemajna riĉa programo, kiel ekz. lernado de hungara popoldanco, sporteventoj, kunludado, komuna pikniko plifortigis la amikajn rilatojn inter la gelernantoj. Dankon meritas la projektgvidantoj: István BAGÓ kaj lia edzino Kati, Mónika LAKOS kaj Eszter MAYER. Krom Eszter ĉiuj tri instruistoj kun la projektgrupeto venis ankaŭ al Herzberg am Harz en vintro 2013 por fari antaŭpreparojn por la printempa renkontiĝo, rigardi la lokon kaj ekskurseblojn kaj komune festi la novjaron kun la germanaj projektgvidantoj kaj kelkaj lernejoj geamikoj.

La tria kaj lasta vizito inter la 23a kaj 29a de aprilo 2014 okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, kiu havas apartan signifon, ja la lernantoj povis propraokule sperti la E-ofertojn de la urbo, rigardi ZEOjn, vidi E-lingvajn ŝildojn, vojmontrilojn, ekspozicion en la kastela muzeo ktp. En Herzberg same familioj gastigis siajn eksterlandajn partnerojn, Zsófia kaj Ewa kun Christopher KOCH kaj Tobias ZANDER, instruistoj de la E-M-A Gimnazio organizis por ili interesan tutsemajnan programon. La junaj gastoj estis akompanataj de siaj instruistoj kaj venis al la E-urbo por



konatiĝi kun vidindaĵoj, lerni pri lokaj historio, geografio, kulturo, legendoj kaj tradicioj.

Antaŭtagmeze la gejunuloj okupiĝis pri diversaj projekt-taskoj, posttagmeze estis tempo por urborigardado, ekskursoj al Goslar kaj la Harz-montaro, vizito al Göttingen, Bad Lauterberg, kie ili pasigis – kiel en

Győr – posttagmezon en naĝejo, kie lingvaj bariloj tute malaperis kaj ĉiuj kune ludis kaj amuziĝis.

Dum longe atendita ekskurso al Berlino ni rigardis Alexander-placon, la katedralon, Reichstag², la Muzean Insulon, faris grupfotojn antaŭ la Brandenburga Pordego kaj la Berlina Muro. La bonegan tutsemajnan etoson ne malhelpis eĉ pluvo dum la rostadfestoj en la ĝardeno de gastama familio; la kunestado, babilado de pli ol kvardek personoj en malgranda salono eĉ plifortigis la komunajn travivaĵojn kaj amikecon. La lastan projekttagon la tuta lernejo kaj gastoj el la urbo estis invititaj al la projektifesto en la aŭlo de la gimnazio, kie pleniĝis la ĉ. 500 sidlokoj. Ni ĝuis la altnivelan muzikan kontribuon de la gimnazia orkestro, la kontribuon de gimnazia klaso pri lernado de fremdaj lingvoj kaj la ĉarman prezentadon de dancgrupeto.

Aparta surprizo estis, ke urbestro Gerhard WALTER en Esperanto salutis la partoprenantojn kaj emfazis la gravecon de lernado de la internacia lingvo. Ni rigardis resuman filmon pri la dujara kunlaboro, rememoris komunajn projektajn aktivaĵojn, interŝanĝis donacojn kaj fine kune kantis en Esperanto la Eŭropan Himnon.

La rezulto

La projekto baldaŭ finiĝos, sed adiaŭante niajn gastojn kun larmoj en la okuloj ĉe la stacidomo, planante sekvajn sed ĉi-foje jam tute privatajn vizitojn, ni estas certaj, ke la amikecoj daŭros, ke ni certe revidos unu la aliajn denove kaj ni ne forgesos, ke ni havis tiujn belegajn komunajn

² Tiu konstruaĵo enhavas la nuntempan germanan parlamenton Bundestag. – NdIR

travivaĵojn dank' al Esperanto. La preskaŭ dujaraj kontaktoj kaj kunlaboro rezultigis intensan aktivecon kaj verajn amikecojn; post la reciproka gastigado en propraj domoj de familioj fortiĝis la sento de aparteneco unu al la aliaj kaj ni ĝojas, ke ni, instruistinoj el Herzberg, povis esti ne nur iniciatintoj sed daŭraj helpantoj de tiu procezo.

Zsófia KÓRÓDY kaj Ewa KUKIELKA, Herzberg am Harz – la E-urbo

NdlR: *La sekva artikolo celas nur informi la legantojn pri prezentaĵo, kiun Profesoro GLOSSOP faris ĉe tute anglalingva internacia konferenco pri la FUTURE OF EDUCATION (estonto de edukado). Li parolis nur nome de si mem, ne oficiale nome de ILEI aŭ de iu ajn organizo. Tiu konferenco okazis en Florenco, Italio, la 13-an kaj 14-an de junio 2013.*

La detalojn (tute en la angla lingvo) oni povas trovi ĉe

<<http://conference.pixel-online.net/foe2013/conferenceproceedings.php>>.

Kelkaj partoprenantoj ĉe tiu konferenco antaŭe sciis nenion pri Esperanto.


Nun ni devus efektiviĝi neglektitan revolucion proponon

1. La maltrafita oportuno

Unu el la unuaj sugestoj proponitaj en la Asembleo de la Ligo de Nacioj en Decembro 1920 estis tiu de Lordo Robert CECIL, ke por trakti „la lingvajn malfacilaĵojn kiuj malpermesas rektajn rilatojn inter la popoloj” oni esperas ke „la instruado de la internacia lingvo E-o” „iĝos ĝenerala en la tuta mondo, por ke infanoj el ĉiuj landoj ekde nun scipovu almenaŭ du lingvojn, sian gepatran lingvon kaj facilan rimedon de internacia komunikado.”[1]

Bedaŭrinde tiu revolucia ideo ne estis efektivigata.

En la Asembleo de la Ligo de Nacioj iu ajn propono povis esti akceptita nur se ĉiuj membro-ŝtatoj aprobis ĝin. Unu ŝtato kontraŭis la proponon de Lordo Cecil. Kiu ŝtato? Francio. Kial? Ĉar la propono indikis ke Esperanto estus la monda lingvo instruenda, kaj la francoj pretendis ke la franca lingvo jam estas la monda lingvo.[2]



2. Preter inter-naciismo al tutmondismo

La francoj argumentis, ke Esperanto ne havas nacian kulturon. Sed tiu argumento supozas la inter-naciisman vidpunkton de la 20-a jarcento anstataŭ la tutmondisman de la 21-a jarcento. Inter-naciismo konceptas la mondon kiel kolekto de apartaj landoj kies anoj estas baze enfermitaj interne de siaj propaj landoj kaj kiuj interagas unu kun la alia nur per internaciaj organizaĵoj. La figuro por inter-naciismo estas monda mapo kun la diversaj ŝtatoj montritaj en diversaj koloroj. La tutmonda komunumo de la 21-a jarcento estas malsama. Ĝia koncepto estas bazita sur la fotoj de la Tero el la kosmo. Ĉiuj homoj estas membroj de unu planeda komunumo. Sekve ni devus povi komuniki rekte unu kun la alia. Kiam oni traktas edukadon, oni devas konsideri la mondon de la estonteco.

Grava demando estas, kion vi devus fari rilate al lingva edukado por infanoj? Ni bezonas planon laŭ kiu ĉiuj el ili lernos almenaŭ unu komunan lingvon, por ke ĉiuj el ili en ĉi tiu planeda komunumo povu komuniki kun **ĉiuj** aliuloj, ne nur kun tiuj kiuj hazarde loĝas en landoj kiuj uzas la saman nacian lingvon.

3. La lingva-edukada demando antaŭ ni

Kion ni devus fari rilate al la lingva edukado por niaj infanoj? Ĉu ili devus lerni almenaŭ unu komunan lingvon? Se jes, kiun lingvon oni devus elekti? Ĉu ni penus uzi kiel la tutmondan lingvon iun nacian lingvon kiel la anglan aŭ la ĉinan? Aŭ ĉu ni devus elekti kiel la tutmonda lingvo iun naciec-neŭtralan, artefaritan, pli facile lerneblan lingvon kiel Esperanto?

Eĉ kvankam la angla estas mia denaska lingvo, mi volas argumenti kontraŭ la vidpunkto ke la angla devus esti la komuna tutmonda lingvo instruenda al infanoj. Mi opinias, ke la racia kaj morale justa elekto por la unua fremda lingvo por ĉiuj infanoj estas Esperanto. La fina celo devus esti, ke homoj lernu multajn lingvojn, sed ĉiuj infanoj devus lerni almenaŭ la komunan tutmondan lingvon, por ke ili povu komuniki rekte kun ĉiuj aliaj Teranoj.

4. La morala dimensio de la tutmonda-lingva demando

Ni devus konsideri serioze la moralan dimension de ĉi tiu demando. Mi opinias ke estus fundamente malmorala afero elekti iun ajn ekzistantan nacian lingvon por servi kiel la tutmonda lingvo. Se iu ajn nacia lingvo iĝus la tutmonda lingvo, landoj kiuj uzas tiun lingvon akirus statuson super la

aliaj lando. Ĉi tia luktado por statuso jam produktis du mondmilitojn. Tian inter-naciisman konkurson ni devas ekfina.

Uzi jun ajn nacian lingvon estus ankaŭ decido maljusta rilate al ĉiuj infanoj kies unua lingvo estas alia lingvo. Kiel homo kies unua lingvo estas la angla, mi konstante estas memorigata pri la maljusteco de la aktuala situacio. Aliuloj devas lerni novan lingvon, sed mi povas uzi mian denaskan lingvon. Kiel maljuste! Mi estas inter la malpli ol 5 procentoj el la homoj en la tuta mondo, kiuj uzas la anglan kiel sian denaskan lingvon.[3] Tial pli ol 95 procentoj el ĉiuj homoj devas lerni duan lingvon por povi partopreni internaciajn konferencojn, kiuj uzas nur la anglan lingvon. Eĉ se la tutmonda lingvo estus la mandarena ĉina lingvo, necesus ke 88 procentoj el la homoj en la tuta mondo lernu ĝin kiel duan lingvon.[4]

Se iu ajn nacia lingvo estus uzata kiel la komuna tutmonda lingvo, landoj kiuj uzas tiun lingvon havus maljustan ekonomian avantaĝon super aliaj landoj. Krom la avantaĝo ke ili ne devos instrui duan lingvon al siaj infanoj, ili havus la ekonomian avantaĝon ke aliuloj volos veni al iliaj landoj por pli bone lerni ilian lingvon.

5. La kazo kontraŭ la uzo de la angla kiel la tutmonda lingvo

Ĉar necesus, ke ĉiuj infanoj lernu la tutmondan lingvon, ĉi tiu lingvo devus esti relative facile lernebla. Ĉar nia celo estas, ke infanoj lernu multajn lingvojn, ili devus havi bonan unuan sperton, kiu instigos ilin voli studi aliajn lingvojn. La plej bona ebleco estus lerni unue tute fonetikan lingvon, en kiu ili lernus kune la skribitan kaj parolatan lingvon.

La angla ne estas tia lingvo. Ne estas logika situacio, kiam la vortoj „so” (S-O) kaj „do” (D-O), kiuj aspektas tiel simile, devas esti prononcataj tiel malsimile. En la angla lingvo vortoj, kiujn oni literumas simile estas prononcataj malsimile kiel la vortoj literumataj T-H-O-U-G-H kaj T-H-O-U-G-H-T kaj T-H-R-O-U-G-H. La angla lingvo enhavas multajn strangaĵojn, kiel la aldonon de la litero S al verboj en la tria persono singulara. Malregulaĵoj ekzistas rilate al la malsamaj tensoj de la sama verbo, kiel „go,” „went,” kaj „have gone.” Rimarku la malregulan konjugacion de la verbo „to be”: „I am,” „you are,” „he is”, por ne menciigi la fakton ke en multaj vortoj la litero S estas prononcata kiel la litero Z. Ĉi tiuj mallogikaj trajtoj de la angla lingvo eble igas multajn infanojn simple rezigni pri la lernado de iu ajn fremda lingvo.

6. La kialo por la uzo de E-o aŭ versio de ĝi kiel la tutmonda lingvo

Anstataŭ la angla, ni devus uzi Esperanton. Tiuj, kiuj neniam lernis Esperanton, ne komprenas la valoron de ĝia genia karaktero kaj kiel facile oni povas lerni ĝin. Tiuj kiuj neniam instruis Esperanton, ne konstatis kiel rapide infanoj povas lerni ĝin.[5] Ĉiuj povas facile determini kiel ĉiu vorto devus esti prononcata kaj literumata.

Se ĉiuj infanoj en la mondo lernus planitan lingvon kiel Esperanto, aliaj avantaĝoj sekvus. Unu estus la konservado de la minoritataj lingvoj kiuj nun pereus, kiam ili alfrontas lingvojn subtenatajn de potencaj landoj. Se la tutmonda lingvo estus Esperanto, homoj en tiuj minoritataj komunumoj povus daŭre uzi siajn lingvojn interme de siaj propraj komunumoj kaj Esperanton por tutmonda komunikado.

Dua avantaĝo rilate al la postulo, ke infanoj lernu Esperanton, estas ke ili evoluigus pozitivan sintenon al la lernado de aliaj novaj lingvoj. Eksperimentoj montris, ke lernantoj, kiuj lernis Esperanton, poste pli rapide lernas aliajn eŭropajn lingvojn.[6]

Tria avantaĝo de la lernado de neŭtrala tutmonda lingvo kiel Esperanto estas, ke la infanoj evoluigus identecon kiel membro de la monda komunumo, samkiel la lernado de nacia lingvo kondukas al identeco kun tiu nacia komunumo.[7] Se ĉiuj infanoj lernus la saman tutmondan lingvon, ili pensus pri si mem kiel membroj de la tutmonda komunumo kaj estus malpli inklinitaj batali en militoj kontraŭ aliaj membroj de tiu komunumo.

Kvara avantaĝo rilate al la postulo ke ĉiuj infanoj lernu Esperanton estas, ke ili povus uzi modernan teknologion por rekte komuniki kun aliaj infanoj ĉie.[8] Personaj amikecoj povus evolui sen malhelpo de landlimoj kaj malsamaj naciaj lingvoj.

7. Eblaj ŝanĝoj por fari Esperanton pli kulture neŭtrala lingvo

Oni povas konsideri Esperanton esti eŭropa lingvo, kaj sekve oni povus argumenti, ke ĝi devus esti modifata por servi kiel kulture neŭtrala tutmonda lingvo. Ĉu oni povus fari Esperanton pli kulture neŭtrala lingvo, se oni povus enkorpiigi terminojn de aziaj kaj afrikaj lingvoj? Tamen Esperanto eĉ nun en sia aktuala formo estas entuziasme subtenata de homoj tra la tuta mondo. La registaro de Ĉinio faris almenaŭ tiom kiom iu ajn alia landa registaro por subteni la uzon de Esperanto.[9]

Por trakti ĉi tiun demandon, mi proponas ke la Eduka Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (Unesko), kiu en 1954 kaj 1985 adoptis rezoluciojn kiuj esprimis subtenon por Esperanto, nomumu komisionon por evoluigi iomete modifitan, pli kulture neŭtralan version de Esperanto. Oni devus doni al ĉi tiu komisiono limdaton de kvin jaroj. Pluraj spertaj esperantistoj devus esti membroj de ĉi tiu komisiono, inkluzive de kelkaj el Azio kaj Afrika. Ĉi tiu komisiono devus havi ankaŭ membrojn, kiuj bone konas la Hajnuan pinjinon kaj la Bahasan Indonezian lingvon. Se la komisiono ne sukcesus produkti la deziratan modifitan kulture neŭtralan version de Esperanto ĝis la kvinjara limdato, la aktuala versio de Esperanto estus oficiale rekomendita kiel la komuna tutmonda lingvo instruenda al ĉiuj infanoj ĉie.

8. Finaj pensoj

Esperanto estas unu el la plej grandaj inventoj dum la tuta homara historio. Estas granda tragedio, ke ĝi ne estis adoptita kiel la monda lingvo en la inter-naciisma 20-a jarcento. Nun dum la tutmondiĝa 21-a jarcento ĝi ankoraŭ ne ricevas la subtenon, kiun ĝi meritas. Ĉu io ajn povas esti pli grava afero por la estonteco de edukado ol la tutmonda sindevontigo instrui al ĉiuj infanoj ĉie facile lerneblan komunan tutmondan lingvon kiel E-o?

Ronald J. GLOSSOP, Southern Illinois University (Sud-Ilinojisa Universitato) en Edwardsville (SIUE), Edwardsville, Illinois 62025, Usono, rglossop@mindspring.com

[1] Peter G. Forster, *The Esperanto Movement*, paĝo 172.

[2] La *The Esperanto Movement* de Forster informas nin kiel la propono de Lord Robert Cecil iniciatis la diskuton, kaj ĝi ankaŭ liveras detalan rakonton pri tio, kio poste okazis rilate al Esperanto en la Ligo de Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj. Vidu ĉapitron sesan, paĝojn 169-187.

[3] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. Sur paĝo 717 la indikita nombro da homoj, kiuj uzas la anglan kiel sian unuan lingvon, estas 328 milionoj. Sur paĝo 733 la indikita nombro de homoj en la mondo estas 7 017 543 964. Tial la proporcio de homoj, kiuj uzas la anglan kiel sian unuan lingvon, estas 4,67436 el cent.

[4] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. Sur paĝo 717 la indikita nombro da homoj, kiuj uzas la mandarenan ĉinan lingvon, kiel sian unuan lingvon, estas 845 milionoj. Ĉe paĝo 733 la indikita nombro da homo en la mondo estas 7 017 543 964. Tial la proporcio de homoj, kiuj uzas la mandarenan ĉinan lingvon kiel sian unuan lingvon estas 12,04218 el cent.

- [5] Alvino E. Fantini kaj Timothy G. Reagan, *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. Vidu aparte paĝojn 27-33.
- [6] Helmar Frank, „Valeur propédeutique de la langue Internationale” [„Valoru propedeŭtika de la lingvo internacia ”], *Journée d'étude sur l'Esperanto*. Université de Paris-Vincennes, nov. 1983, paĝoj 121-136 kaj J. H. Haloran, „A four-year experiment in Esperanto as an introduction to French,” *British Journal of Educational Psychology*, Vol. 22, nr. 3, nov. 1959, paĝoj 200-204.
- [7] Kurt E. Müller (eld.), *Language Status in the Post-Cold-War Era*. Vidu aparte paĝojn 117-139.
- [8] Humphrey Tonkin kaj Grahame Leon-Smith, *The Future of Modern Languages in English-speaking Countries*, (Esperanto Documents, New Series, 18). Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 1979, paĝo 17.
- [9] Ulrich Lins, „Esperanto as Language and Idea in China and Japan,” *Language Problems and Language Planning*, 32:1 (2008), paĝoj 47-60 kaj „China Interreta Informa Centro: Historio de Esperanto,” <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.

El la landoj kaj sekcioj

Brazilo

Kun bedaŭro mi sciigas vin pri la forpaso de Prof. D-ro Geraldo MATTOS Gomes dos Santos (1931-2014), 82-jara, eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto – cetere, akceptita en la Akademio en 1970, li estis ĝia dua plej malnova ano. Li estis lingvisto, emerita profesoro de Federacia Universitato de Paranao kaj de Pontifika Katolika Universitato de Paranao – PUCPR (li estas la aŭtoro de la teksto de la Himno de PUCPR). Lia vasta verkaro estas plurfaceta: ĝi inkluzivas lingvistikajn studojn pri la portugala kaj pri E-o – kun emfazo sur la origino de la Internacia Lingvo kaj ĝia strukturo; lin speciale allogis la problemo de Esperantaj participoj -, studoj pri instruado de tiuj du lingvoj, poemoj kaj romanoj originale verkita en E-o. E-on li lernis en 1947-1948.



Li estis iama prezidanto de Paranao E-Asocio, kaj ankoraŭ en 2011 kaj 2012 li gvidis serion da prelegoj en E-o pri diversaj aspektoj de la gramatiko de ĉi tiu lingvo kaj pri ĝenerala lingvistiko en la sidejo de la

Asocio, en Kuritibo. En junio 2013 li ĉeestis la reinaŭguran ceremonion de Stel-Domo en la tereno de Pontifika Katolika Universitato de Paranao. Lastoktobre li estis trafita de cerbovaskula akcidento, kaj ekde tiam lia kuracado okazis parte en malsanulejo, parte hejme. La 8-an de marto grupo da esperantistoj vizitis lin, kaj li kun granda malfacileco babilis kun ili, en Esperanto kaj en la portugala. Li daŭre estis bonhumora kaj lia menso estis vigla. Dimanĉe la 23-an de marto li estis en sia hejmo kaj forpasis dumdorme, proksimume je tagmezo.

Ivan COLLING

Germanio

La germana ILEI-sekcio kunvenos en Erfurt dum Germana

Esperanto-Kongreso (GEK)

Kiel ekde multaj jaroj, ankaŭ en 2014 okazos kunsido de la instruistoj dum la landa E-kongreso. La membroj de la Asocio de Germanaj E-Instruistoj, la germana ILEI-sekcio, kunvenos en Erfurt inter 15:30-16:45, la 7an de junio 2014 kadre de la 91a Germana E-Kongreso (<http://www.esperanto.de/gea.malnova/gek2014.html>). Ĝi okazos en la kongresejo „Haus am Breitstrom”, Evangelia Konsilantara Gimnazio („Ratsgymnasium”), *Meister-Eckehart-Str. 6, D-99084 Erfurt*. La programo enhavos jarraporton, spertinterŝanĝon kaj planadon por la sekva agadjaro. La kunveno estas publika, ni esperas ĉies aktivan partoprenon. Se estos sufiĉaj aliĝintoj, okazos ankaŭ KER-ekzameno.

Kontakto: *Zsófia KÓRÓDY, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario



SIRKÓ Ilona (1951-2014) mortis la 15-an de aprilo en la urbo Balassagyarmat. Ŝi finis la E-fakon krom la hungara en ELTE ĉe Prof. SZERDAHELYI. Ŝi dediĉis grandan parton de sia vivo al Esperanto: laboris en la oficejo de HEA, ankaŭ poste ŝi multe kontribuis, ekz. al la eldonlaboroj. Ŝi partoprenis en la ellaboro de la Hungara-Esperanta vortaro. Dum la lastaj pli ol dek jaroj ŝi instruis Esperanton al grupoj kaj sukcese pretigis multajn homojn al la ŝtata lingvoekzameno. Ŝi iniciatis, ke la gimnazio en Bercel alprenu la nomon de Kolomano KALOCSAY, kaj parte instruis en la lernejo, tiel 27 gelernantoj plenumis la abiturientan ekzamenon pri E-o dank'al ŝi inter 2010 kaj 2012.

Ilona KOUTNY

Fotu nekutime!!

Kiam okazas kunveno, kurso, kongreso, multaj homoj ŝatas foti. Poste aperas en la movadaj revuoj fotoj montrantaj grupon kun flago, disdonon de diplomoj, sidantajn ekzamenatojn... Ĉu foje ni povus vidi ion alian??

Okazas fotokonkurso. Por lanĉi ĝin ni aperigis foton kun prezidantino, kiu dormas ekstere sur benko. Nun ni aperigas du personojn en gaja etoso; iu fotis ilin en Mongolio en 2010 dum kongreso de Komisiono pri Azia E-Movado (KAEM); temas pri Mireille GROSJEAN, nun prezidantino de ILEI,

kaj Sinjoro PARK Yongsung („Nema”) el Koreio, nun sekciestro.

Certe vi sukcesos foti originale, nekutime. Imagu ion! Teatrumu iomete! Poste sendu viajn fotojn al mirejo.mireille@gmail.com.

La konkurso estas malfermita al niaj membroj. La temo de la foto kongruu kun Esperanto-aranĝo. Ĉiu membro rajtas sendi ĝis 3 fotojn. Eble iu lerta fotisto volos

partopreni kaj tiel ni akiros novan membron... Kiu scias?

La fotoj devas esti senditaj antaŭ la 31a de oktobro 2014. La ĵurio konsistas el 3 personoj: Sinjoro Brian MOON, Sinjoro HUANG Yinbao alinomita „Trezoro” kaj Sinjorino Mireille GROSJEAN. Ni uzos niajn 4 kolorajn paĝojn por montri la plej amuzajn fotojn. Premioj konsistos el libroj. Vidu la unuan anoncon de la konkurso en *IPR 2013/4* paĝo 25. (MG)

Korekto

En la artikolo pri la programo „Kiom internacia estas via vorto?” (vidu www.espevoluo.org) en *IPR 2014/1* p. 20-22 enŝteliĝis ĝena tajperaro, kiu faris parton de la artikolo nekomprenebla. Temas pri la difino „en la plimulto de lingvoj” en la 15a linio, kvazaŭ oni povus taksi ĉiujn lingvojn same gravaj. La aŭtoro preparolas la ideon, ke oni pesu la gravecon de lingvoj laŭ ilia nombro da denaske parolantoj. „Por Eŭropo tio ŝajnas akceptebla ideo, ĉar la eŭropaj mondlingvoj (angla, franca, hispana, portugala) tiam pezas laŭ siaj nombroj da denaskaj parolantoj en Eŭropo kaj la angla NE okupos dominan pozicion. Kontraŭe, la rusa havas la plej grandan pezon: 116 000 000 kaj poste la germana: 84 432 210.” *Pardonu! (J.N. redaktoro)*

Eksteresperantuja rekono

La ĉi-jara Konferenco de ILEI estas aŭspiciata de la urugvajaj Universitato de la Respubliko kaj la Unesko-Komisiono apartenanta al la Ministerio pri edukado kaj kulturo. Krom tiu ministerio la konferencon subtenas per oficiala apogdeklaro ankaŭ la Ministerio pri turismo kaj sporto. Tio ne estas la solaj ekstermovadaj rekonoj de la Konferenco.

La 24-an de marto 2014 kvar reprezentantoj de ILEI kaj de LKK de ĝia 47a Konferenco – Sonia Risso, Radojica Petroviĉ, Ana Montesinos kaj Daniel Bebelacqua – vizitis la regionan sidejon de Unesko en Montevideo kaj interparolis kun la respondeculino pri edukado Maria Paz Echeverriarza kaj respondeculo pri kulturo Frédéric Vacheron. Ambaŭ akceptintoj montris bonan komprenon pri E-o ne nur kiel lingvo, sed precipe kiel movado por celoj parencaj al tiuj de Unesko, do dezirinda partnero de Unesko. Sekve ili esprimis intereson pri kunlaboro okaze de nia Konferenco, donis utilajn rekomendojn kaj esprimis pretecon mem kontribui se ili estos en Montevideo dum la konferenca semajno, ĉu per ĉeesto aŭ salutmesaĝo, ĉu per prelego dum aŭ ekster la simpozio pri la konferenca temo, ĉu alimaniere.

S-ino Echeverriarza emfazis la novan rigardon al la temo edukado, kiun Unesko havas danke al la Ĝenerala Direktorino Irina Bokova. Laŭ la nova dujara plano por edukado mondscale, en la 5 regionoj de Unesko oni laboras por plibonigi la kvaliton de la instruistoj. Tiu laboro estas tre grava en Sudameriko, sed restas malfacile plenumbla pro grandaj problemoj en aliaj mondopartoj. (*Vidu artikolon de MacGill en p. 6*). Kontribuo de ILEI estos bonvena. S-ro Vacheron prezentis al ni la agadon de Unesko en la kampoj, pri kiuj li specife respondecas kaj pretas kunlabori: minacataj lingvoj kaj protektado de kultura kaj natura heredaĵo. Li esprimis la opinion, ke laŭ la agadceloj de ILEI kaj programo de la Konferenco, ĝi meritas aŭspicion de la Ĝenerala Direktoro de Unesko.

La 25-an de marto la sama kvaropo el ILEI havis konferenc-rilatan kunvenon en la Lingvistika Instituto de la Humanistika Fakultato de Universitato de la Respubliko. Profesorinoj, kun kiuj ili interparolis, emfazis grava la fakton, ke la Universitato aŭspicias la Konferencon. Tio malfermas kunlaborpordojn kaj inspiras universitatanojn interesiĝi pri la

Konferenco, precipe pri ĝia simpozio, kaj eventuale mem partopreni. Estis interkonsentite resti en kontakto por efektiviĝi la kunlaborpretecon.

Solena inaŭguro en la urugvaja parlamentejo

Solena inaŭguro de la 47-a konferenco okazos lundon (la duan konferencan tagon, la 21-an de julio) en la parlamentejo de Urugvajo (Palacio Legislativo, inter urugvajaj esperantistoj nomata "Leĝa Palaco"), en kiu assembleis Unesko en la jaro 1954, kiam estis akceptita ĝia unua rezolucio pri Esperanto. La inaŭguro ne okazos en la sama salonego, en kiu kunsidis Unesko, sed en apuda malpli granda salono, same solena kaj adekvata por la dimensio de ILEI-Konferenco. Tamen la konferencanoj vidos ankaŭ la grandan salonon dum trihora programo en la Palaco, kiu antaŭvidas vizitpromenon tra la Palaco kun oficiala ĉiĉerono, ĉio senpaga.

Por la solena ekstere videbla inaŭguro estas elektita lundo kiel labortago, kiam ŝtataj kaj aliaj oficialuloj kaj altranguloj pretos veni kaj kune kun ILEI omaĝi la 60-jariĝon de la rezolucio pri Esperanto. Malpli pompa, interna malfermo de la konferenca laboro okazos dimanĉon, la 20-an de julio, en la konferencejo „Ateneo” de Montevideo.

Loĝado kaj manĝado

Por dumkonferenca loĝado ni rezervis ĉambrojn en la hotelo "Los Angeles" kun matenmanĝo, sendrata retkonekto, banĉambro kaj necesejo, kaj aliaj kutimaj komfortaĵoj, je 15-minuta promendistanco de la konferencejo (Ateneo de Montevideo). En la sama hotelo okazos la unuataga akcepto de konferencanoj kaj la interkona frandvespero sabaton la 19-an de julio. La prezoj por unu tago/persono estas:

- 19 EUR en kvarpersona ĉambro,
- 21 EUR en tripersona,
- 27 EUR en dupersona kaj
- 43 EUR en unupersona ĉambro.

Eblas rezervi ankaŭ ĉambrojn en pli luksa, kvarstela hotelo „Embajador”, 250 m de la konferencejo, kun pli altaj prezoj (ankoraŭ ne konfirmitaj por nia mendo) pli-malpli 50% pli altaj ol tiuj en „Los Angeles”.

Bonvolu mendi kaj interesiĝi pli ĉe la estrarano pri konferencoj, subskribinta ĉi-sube. Por tagmanĝo kaj vespermanĝo abundas restoracioj kaj

vendejoj proksime de la konferencoj. La konferencanoj povos elekti mem laŭ propraj preferoj kaj mondispono.

Alveno kaj interkona frandvespero

La unuataga akcepto de konferencanoj kaj la interkona frandvespero okazos sabaton la 19-an de julio, en la hotelo „Los Angeles”, kie plejmulto de la konferencanoj loĝos. Konferencanoj, kiuj planas alveni pli frue aŭ post la komenca tago, bonvolu anonci tion al LKK aŭ estrarano pri konferencoj por certigi akcepton kaj ricevi bezonatajn informojn. Laŭ la jama tradicio de ILEI-Konferencoj, la konferencanoj estas petataj kunporti tipajn frandaĵojn el siaj lando kaj kulturo por disponigi ilin prezentante sin kaj gustumigi ilin al aliaj konferencanoj dum la interkona vespero.

Dimanĉon la 20-an de julio la konferenca laboro komenciĝos en Ateneo de Montevideo per interna malfermo, prelegoj, kunsidoj kaj aliaj konferencaj aktivaĵoj. La tago finiĝos per la Nacia Vespero, dum kiu estos prezentitaj la tri fonoj de la moderna urugvaja kulturo (indiĝena, afrika kaj eŭropa), tango (poezio, ritmo, danco) kaj karnavalo kiel tipaĵoj de tiu mondoparto, la specifa gaŭĉa kulturo kaj diversaj aspektoj de prizorgado pri infanoj kaj ilia edukado.

Ekskursoj, bankedo, transiro al Bonaero

Urugvajo proponas abundon da historiaj, kulturaj kaj geografiaj vidindaĵoj kiel konferencajn ekskurscelojn. Frandaĵoj de urugvaja kuirkulturo estos konsumataj dum la konferenca bankedo, sed ne nur tiam.

Tuttaga ekskurso dum la ekskursita tago (mardo, la 22-a de julio) gvidos orienten de Montevideo, al Punta del Este – Casa Pueblo – Piriápolis – Estancia Renacimiento – Atlántida, kun tagmanĝo en tipe urugvaja Estancia Renacimiento. Aliaj promenaj kaj busaj ekskursoj tra Montevideo mem ebligas konatiĝon kun ĝia kultura kaj arkitektura riĉeco.

La lastan konferencan tagon, la 25-an de julio, estos organizita komuna veturo al Bonaero por la UK kun trihora ekskurso tra la historia urbo Colonia (okcidente de Montevideo): buse ĝis kaj tra Colonia kaj prame ĝis Bonaero.

*Radojica Petroviĉ, estrarano pri konferencoj,
radojica.petrovic.rs@gmail.com*

Granda sukceso por Juna Amiko

Nepre malkovru tiun valoran revuon, lernilon, progresigilon, amuzilon!! Post la apero de du numeroj faritaj de nia nova redaktoro Stano MARČEK, ni aŭdas laŭdojn, ni ricevas komplimentojn, ni akiras novajn abonantojn. Sekvu tiun vojon kaj abonu ankaŭ vi!! Tiel vi atingos bonan ekvilibron inter nia organo *IPR*, serioza lertiga revuo, kaj *Juna Amiko*, malstreĉa legaĵo alimaniere riĉiga. (MG)

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysteester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnseksioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.
Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

UN: komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyster Miro.**

UNESKO (kun statuso de observanto): Rezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud**

(ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <*ilei.kasisto@gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijkplei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <*jozefo.nemeth@gmail.com*>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*moerbeekr@gmail.com*>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo la 18-an de majo 2014,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2014.**



Malfermo de la 5a Afrika Kongreso de E-o. De maldekstre: Jérémie Sabiyumva (Burundo), Emile Malanda (Sud-Afriko), Ruphino Houssou (Benino). Ĉu E-o alprenas vortojn el afrikaj lingvoj? (Bv legi la artikolon de R. Glossop en p. 30)



Studu en Poznano! (vd p. 11)

En tiu konstruaĵo
„Parlamenta Palaco”
okazos la solena malfermo
de la 47a Konferenco de ILEI
lunde la 21an de julio 2014
je 10:00

